

Numero: 298.
Marto 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Printempa venteto

En mia koro estas printempo. Ĉiam mi sentas, se ĉi sezono alvenas mia korpo rejuniĝas. Mi aŭdas la gajan pepadon de la birdoj. Mi sentas la ebrigan odoron de la naturo.

Mi ne kredas, ke nia Tero estas infero, kie nur kreskas suferoj kaj doloroj.

En la printempa kampo devas esti malgranda semo, kiu naskiĝos en iu tago kaj por ni homoj alportos feliĉon kaj pacon.

Sed tion ĉi ni devas kredi kaj ni devas preĝi al Dio por ke li ne forlasu nin! Permesu al ni, ke ni vivu en eterna paco. La homaro jam suferis multe. Fluis multe da ruĝa, homa sango kaj en ĉiun domon rikoltis jam vanta morto pro la stulteco de l' homo.

Fine ni fariĝu plenaĝuloj, kiuj povas vivi pace unu kun la alia. Ofte ankaŭ bestoj estas pli saĝaj ol ni homoj.

Besto ne murdas pro ĝuo. Besto volas nur vivi, defendi, vivteni siajn idojn.

Sed ni homoj fabrikas bombojn, tankojn por pereigi uebojn kaj vilaĝojn, kaŭzi morton por la homfratoj.

Kial? – mi kriegas al la ĉielo. Sed mi ne ricevas respondon.

Kiel sciis la ĉielo la respondon.

La ĉielo nur mutas kaj ridetas pri ni. Iliaj lumoj radias al ni, nian sorton nur ni homoj povus plibonigi.

Printempe mi ĉiam sentas; alvenis nova epoko kaj nun ekde tiu ĉi tago la homo rekonsciĝos kaj ni komencos pli belan, pli pacan mondon.

Mi esperas, la printempa venteto forblovas la malbonon. Ĉio estos bela kaj bona. Ni denove povos kredi en la estonto.

— Redaktanto —



La lingvo de la bestoj

Kiel komunikas la bestoj? Neeble, ke ili ne komprenas unu la alian.

Mi ŝatus ellerni iun bestan lingvon por ke mi povu babiladi kun ĝi.

Ni homoj estas malsaĝaj, ĉar ni ne povas ellerni la lingvon de nia kato aŭ hundo.

Onidire la hundoj komprenas la homan parolon. Eble ili povintus paroli en homa lingvo, sed ili ne deziras malkaŝi ĉi tiun kapablon.

Kiom bonege estus, se ni povus babiladi kun nia kato aŭ hundo. Certe ili rakontus al ni multajn interesaĵojn. Ni eksciis, kial ili servas nin, kiam ni homoj estas tre malbonaj al ili.

Ne ĉiu homo estas bona. Ni multfoje ofendetas, eĉ torturas la bestojn, Kial babiladi kun ni, se ni estas malbonaj. Ni homoj ne komprenas la lingvon de la alia nacio. En la mondo estas granda lingvoĥaoso. Ofte la homoj militas pro lingvaj miskomprenoj.

La katoj kaj hundoj nur ridas pri ni, kial ni estas malsaĝaj.

Mia avo rakontis al mi antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis infano, ke lia kato ekparolis en homa lingvo. Lia kato plendis al li, ke ĝi trompiĝis, ĉar la homo estas tre malbona. La kato adiaŭis de mia avo kaj ĝi forlasis la hejmon. Li neniam revidis la beston. Onidire la kato serĉis al si pli bonan hejmon.

Eble tiel estis, eble ne. Kvankam mia avo neniam kutimis mensogi. Mi kredas lin.

Aliffoje iu diris, se kato ekparolas en homa lingvo, tiu mortos en la sekva tago.

Fakte mia avo ne vidis plurfoje la katon.

Min kiel infanon tre interesis ĉi historio de la kato. Ĉu vere kato povas ekparoli en homa lingvo?

Hodiaŭ mi provis paroligi mian katon. Dio mia, la kato ne deziris ekparoli. Ĝi rigardis al mi per malgajaj okuloj, kvazaŭ ĝi dirintus:

— Mi ne estas stulta malkaŝi al vi mian scion. Mi komprenas vin, sed mi ne helpas. Unue vi homoj ellernu mian lingvon. Se vi scios la katolingvon, tiam ankaŭ mi ekparolos – ĝi svingigis la voston kaj ĝi eliris el la domo.

Vane mi iris post ĝi, mia kato ne emis paroli kun mi.

— Ŝaŝa —



Ankaŭ niaj plej kuraĝaj sonĝoj estas realigeblaj

— István Örkény —



- Kara Francisko, la tria hundo ne laboras.
- Bedaŭrinde mia vipo estas iomete mallonga.
- Eĉ mi vidas, kvazaŭ ĝi estus lamanta iomete.
- Kompreneble, ke ĝi lamas. Ja ĝi havas nur tri piedojn.
- Ho, vere...Ĉu ne estas krueleco laborigi kriplan beston?
- Helena, bonvolu rigardi pli bone, miaj dekdu hundoj estas tripedaj!
- Ve, kompatindaj bestoj!
- Helena, anstataŭ ili kompatu min! Kiom laciga laboro estis ĝis sukcesis trovi dekdu tripedajn hundojn.
- Eble mi ne estas fakulo, sed oni pensus, normalaj hundoj povus labori pli bone kaj pli persiste.
- Pro tio mi ne diskutas. Sed mi estas denaska urbano. Kion fari je dekdu kvarpedaj hundoj?
- Francisko, ĉu vi timas de ili?



- Mi timas ankaŭ de kulopiko. Oni devas estimi la fortojn de la naturo. Ni supozu, se ĉi tiuj hundoj havas kvar piedojn! Ni supozu, ili frenezigos en iu tago pro io! Supozu ili elŝiregas la kondukilon el mia mano! Mi ne volas pensi pri tio, kio okazus, kara Helena.
- Malgraŭ ĉi tio mi ne komprenas. Se vi timas de hundoj, tiam, kial per ili vi tirigas vian aŭton?
- Ĉar mi stiras aŭtomobilon malbone.
- Tion oni povas ellerni.
- Certe duone, sed ne tute... La homo kaj aŭtomobilo ne estas sama.
- Cirkaŭrigardu! Ĉu vi vidas aŭtomobilon tirante pere de hundoj?

— Granda problemo estas tio. Bedaŭrinde oni ne povas atingi la teknikon. Oni uzas ĝin, sed efektive oni timegas de ĝi.

— Mi ne timas de la aŭtomobilo.

— Aŭskultu min, ĉi tiu Simca veturas hore po centkvindek kilometroj...



- Francisko, ne malgajigu min! Mi ŝategas la rapidecon!
- Vi estas iomete malkontenta. Ni ekiris de Budapeŝto antaŭ dek tagoj, kaj rigardu, ni jam estas ĉe la urbeto Siófok.
- Per dekdu hundoj ĝi ne estas tiom granda rezulto.
- Jes kompreneble. Sed mi jam bremsis en Budapeŝto.
- Ĉu vi ne estas tro singardema?
- Ĝuste por tiu ĉi tempindiko estas kreita la homo.
- Ĉu vi vidas kiom da homoj? Ĉiuj rigardaĉas nin.
- Ili envias nin.
- Ili ŝtoniĝis pro la vidaĵo.
- Ĉar ili vidas, ke ankaŭ niaj plej belaj sonĝoj estas realigeblaj.

— tradukis: Apáti Kovács Béla —



POEZIO

Hajko estas memstara poemo el 17 silaboj.
Hajko ne portas titolon, malsame al ordinaraj poemoj.

Hajko estas poemo por deklami. Provu vian verkon voĉlegante.

Rimo ne estas necesa en hajko.
Sezonvorto estas ŝatata, sed ne deviga.
Tranĉo kaj salto estas la kondiĉo de bona hajko.
Provu hajkon per kombinado de du objektoj.
Ne esprimu senton, sed postlasu resonon.
Ellasu nenecesajn vortojn, ĉar koncizeco donas forton.

Provu multe, post ĉio, laŭ via gusto.
/Ardo Hu/

Elizabeta Tuboly

Malvarme lumas
Kiel frostanta Luno,
La strata lampo.

Diamantbrilo.
Ĉirkaŭ lampo neĝflokaj
Dancas kun vento.

Diamantpolvo
De falitaj neĝflokaj
Kovras la vojon.

Ardo Hu

ĉirkaŭ la lampo
neĝflokaj dancas ronde
sub frida luno.

blankiĝas vojo
en frosta nokto venta
ni paŝas lante

Cindy McKee

:
Pluvas sur nudon.
Staras senfoliece
plantoj de tero.

Helena Tylipska

Pendas lungongo
en bluo de la ĉiel'
Frida la nokto.

En nebulĉapo
disperdiĝas la voĉoj.
La nokto dormas.

Ardo Hu

Nebulo densa
vualas la pejzaĝon
de fono pensa



Lode van De Velde

Vintra vetero.
Ekstere ludas filin'.
Mukas la nazo.

Eta promeno.
Du manoj chielen kaj
Paĉjo portos min.

Ivanichka Magharova

L'autun' pluvetas.
La birdoj grupbirdardas.
Konfitajh' el figoj.

Ventego. Branĉoj.
La rivero nigriĝis.
La tero spiras.

Furioza vin'
En bareloj aromoj.
Freneza pasi'.

Nuda heliko
senhejma en tretiko.
Polver' en Kosmo.

Piektis arane'
blankan rozon en reto.
Amsenta ludo.

Demetis tufon
li en petolema harar'.
La vert, ekbrilis.



Por infanoj



Kato kaj ĝiaj amikoj

— hungara popolfabelo —

Kaj estis kaj ne estis, mi ne scias kie ĝi estis, sed iam certe estis kato. Ĉi tiun malfeliĉan katon ne ŝatis la dommastrino. Pro tio la kato forlasis la domon. Antaŭ ĝi estus forlasinta la domon sur la korto ĝi trovis karoton. El ĝi la kato faris ĉaron. Ĝi tuj kaptis du musojn, kiuj tiris la veturilon. Per ĝi la kato ekiris al la mondo. Ĝi iris, iradis tra la monto, tra la kampo ĝis la musoj laciĝis. La kato ĉagrenis, ke per la laciĝantaj musoj ĝi ne povos iri longe. Ĝi kaptis aliajn du musojn kaj ili ankaŭ devis tiri la ĉaron por ke ili veturi pli rapide. Kiel ili iris, iradis, ili renkontas krakon.

— Kien vi iras, kato? — demandis la krako.

— Mi iras laŭ mia nazo al la mondo.

— Permesu al mi, ke mi iru kun vi, ĉar la fiŝoj forpelis min!

— Kial vi estis forpelita?

— Ĉiam mi pikadis ilin per mia tranĉilo.

— Bone, venu kun mi!

Ili iras, iradas plu kaj subite ili trovas du ovojn sur la mezo de la vojo. Neatendite iu ovo ekparolis:

— Kien vi iras, kato?

— Mi iras laŭ mia nazo al la mondo.

— Ĉu ni povas iri kun vi? Nia dommastrino devigis nin, ke el du ovojn naskiĝu tri kokidoj.

— Bone, venu kun mi!

La du ovojn sidiĝis sur la karotoĉaron kaj veturis kune kun la kato. Subite dek hirundoj kaj dek alaŭdoj flugis sur la ĉaron. Ili ne petis permeson de la kato. Ankaŭ ili veturis per la ĉaro. Apenaŭ ili veturis kelkajn minutojn, kiam sur la vojo ili trovis amason da pingloj. La kato demandas ilin:

— Kial vi estas ĉi tie?

— Tiel, ke nia kunulo pikis la manon de nia dommastrino kaj ŝi koleriĝis. Poste ŝi forĵetis nin ĉiujn.

— Nu, venu ankaŭ vi kun ni!

Ili iris, iradis plu kaj vespere ili atingis malgrandan dometon. En tiu dometo loĝis maljunulino. La kato iris en la domo kaj ĝi salutis ŝin ĝentile. Ĝi petis tranoktejon de ŝi por nokto. La maljunulino respondis:

— Mi volonte donus al vi tranoktejon, sed nokte venos banditoj ĉi tien, vi ne trovos trankvilon en la domo..

Fine la kato sukcesis konvinki la maljunulinon kaj ŝi permesis tranokti en la domo. La kvar musoj trovis dormejon en la stalo. La du ovojn sidiĝis en la ardan cindron. Kankro en akvuĵon. La pingoj en la mantukon. La kato serĉis lokon por si apud la pordo. La hirundoj flugis sub la defluilon de la domo. La alaŭdoj okupis la tegmenton.

La maljunulino pravis, nokte ekaperis la banditoj. En la domo ili sidiĝas apud la fornono. Ili volis preni fajron por ekbruligi la pipon. Apenaŭ ili tuŝis la ardan cindron, la du ovojn eksplodiĝis timigante la banditojn.

Ve, ektimis la banditoj. Ili tuj eksaltis kaj kuregis al la akvuĵon por lavi manojn, sed tie la kankro pikis ilin dolorige. Por mildigi la doloron ili volis viŝi la manojn, la tieaj pingoj tuj vundiĝis ilin. La banditoj ĉiuj volis elkuri el la domo, sed apud la pordo la kato atakis la banditojn skrapante ilian vangon. Fuĝinte sur la korto ili aŭdas la laŭtan pepadon de la hirundoj kaj la alaŭdoj:

— Banditoj! Banditoj!

Tiom ektimis la banditoj, ke ili forkuregis, neniun scias kien. Plurfoje ili ne revenis al la domo de la maljunulino.

Matene la kato dankis la tranoktejon kaj ili iris plu per la karotoĉaro, kion tiris kvar musoj. Sed alvenante sur ponton, aŭskultu, kio okazis! La musoj ektimis pro io renversante la karotoĉaron en la riveron. Fariĝis granda timego

La hirundoj kaj alaŭdoj forflugis. La kato malfacile naĝis al la bordo, la malfeliĉa kankro restis en la akvo, kompreneble ankaŭ la pingloj.

Se ili ne estus restintaj en la akvo, ankaŭ mia fabelo ankoraŭ daŭrus.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

— Tradukis: Apáti Kovács Béla —




Humoro

La instruistino demandas la infanojn pri la profesio de ilia patro.

- Mia paĉjo estas advokato – diras la unua infano.
- Mia patro estas kuracisto. Li kuracas homojn – diras la dua.
- Mia patro mortis – diris Peĉjo.
- Mi kompatas vin – malgajigās la instruistino. – Antaŭe kion li faris?
- Unue li ruĝiĝis kaj poste li fariĝis blua. Poste li falis sur la tapiŝo kaj li mortis.

– o –



– o –

Peĉjo kaj lia patro ekskursas al ruina fortikaĵo. Ili interesiĝante rigardas la ruinojn. Subite la knabeto ekkrias:

- Rigardu, paĉjo, panjo mia instruis ĉi tie stiri aŭtomobilon!

– o –



Humoro

- Kial ridaĉas la ĝardenkoboldo?
- ???
- Ĉar la herbo tiklas lian sidvangan.

– o –



– Ne fariĝu centjara!

– o –

Frumatene je la kvara horo alvenas hejmen la edzo el la drinkejo. Li komencas senvestiĝi apud la lito. La edzino vekigās kaj demandas:

- Kien vi iras tiom frue, Jozefo?
- Vi pravas karulino, Mi ne ellitiĝos.

– o –



Senlima fantazio de la infanoj